
# *Inspektado pri evoluo de la klinika provo de Soberana 02*




**Soberana 02 en klinika provo fazo III**

Havano, mar 11 (RHK) La kuba  Centro por ?tata Kontrolo de Medikamentoj, Instrumentoj  kaj Medicinaj Iloj(Cecmed, hispane), ekinspektas la klinikan provon fazo III de la vakcina kandidato kontra? Kovim-19 Soberana 02.

La kontrolo ebligos scii ?u oni plenumas la bonajn klinikajn praktikojn postulatajn de tiom kompleksa pristudo, kiel nepra pa?o por avanci al la amasa vakcinado de la insula civitanaro, raportis la loka televido.

La a?toritatoj de la koncerna institucio vizitis ?i-merkrede la kunordigan centron de klinikaj provoj, kiu havas la mision mastrumi integrale la esplorojn.

Ili reviziis la mastrumon de informoj kaj esencajn temojn kiel funkciado de la kunordiga centro kaj la komputejo, kie oni prilaboras la rezultojn en reala tempo rilate la okaza?ojn en la ok municipoj de la ?efurbo, kiuj partoprenas la provon.

La specialistoj deklaris ke ili revizios la tutan dokumentaron, kiuj fontos el la pristudo, anka? revizios la agadon de la etiko-komitatoj kaj de la komitato de datum-kontrolo kaj intervjuos la volontulojn vakcinotajn

por scii ?u ili atingis la informitan konsenton.

Soberana 02 iniciatis la klinikan provon fazo III la pasintan lundon, kun 48 klinikaj lokoj de Havano, kie okazos la vakcinado de pli ol 40 mil personoj.

Tiu ?i estas la plej evoluinta el la kvin kandidatoj kreitaj de la kuba bioteknologia industrio por fronti la Kovim-19. ?iuj kandidatoj trapasas diversajn momentojn de siaj provoj en homoj por konstati la imunan respondon kaj la nefavorajn reagojn.

fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/250320-inspektado-pri-evoluo-de-la-klinika-provo-de-soberana-02

**Radio Habana Cuba**